

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

dimanĉon, la 3-an de Julio, 2016 • numero ses

La tojvo

de Bill MAXEY

Jen alia versio de tre fama poemo de d-ro Zamenhof, verkita uzante radikojn de treege diversaj lingvoj. Evidente la celo estas klare montri, ke Esperanto mem estas apenaŭ internacia. Ĉu vi kapablas diveni la fontlingvon de ĉiu nekonata vorto? (Ekz., *svet-* signifas “mondon” en la rusa.)

*En la sveton tokis uja sento,
tra la sveto nendas kubŭa voko
per tobiloj de anana vento
nun de uko tobu ĝi al uko.*

*Ne al sefo krovon hataŝanta
ĝi la hitan hikas ugjamaon,
al la sveto abade tatakanta
ĝi jaksokas svatan ĉouaon.*

*Sur hajada luga firm-alaso
fahamante unu la tanaan
la narodoj fajnas en saglaso
unu kubŭan krugon ugjamaan.*

*Nia muĝtahida nakamaro
en ŝigoto mira ne ĉokiĝos
ĝis la zura ndoto de l' hitaro
por abada her' tekeleiĝos.*

Pri la neceseja leĝo

de Walter MURAWSKI

La artikolo de Fred MEYER en pasinta numero de la *Fasko* estis tre interesa. Sed devas esti elmontrita, ke la neceseja parto de la leĝo estas nur ŝirmilo. Ĝi agas kiel ombrelo kaŝanta aŭ ŝirmanta la veran intencon de la leĝo. La vera intenco troviĝas en la aliaj partoj de la leĝo, kiun Meyer, en lia artikolo, priskribis jene:

“Sed aliaj partoj de la leĝo ankaŭ diskriminaciis. Parto de la leĝo forprenas la rajton kortume procesi kontraŭ diskriminaciaj entreprenoj. La leĝo ankaŭ malebligas ke urboj kaj lokaj registraroj aprobu lokajn leĝojn pri minimuma pago aŭ infanaj laborkondiĉoj.”

Tiuj kaŝitaj partoj de leĝoj certe ne transvivus voĉdonon en la ŝtata parlamento se ili estus sole proponitaj. Homoj de kaj la dekstra kaj maldekstra flankoj kontraŭus ilin. Sed la industrio kaj entreprenoj volas tiajn leĝojn, kaj ili donas monon al la politikaj partioj, do la parlamentanoj devas

Kio okazos hodiaŭ?

- ★ **7:30 – 8:15 atm**
matenmanĝo
Belk Dining Hall
- ★ **8:30 – 12:15 ptm**
lecionoj
Flowe
- ★ **12:30 – 1:15 ptm**
tagmanĝo
Belk Dining Hall
- ★ **2:00 – 3:15 ptm**
poemoj kaj kantoj
Nazaré LAROCA
Flowe
- ★ **3:15 – 4:30 ptm**
Jarlo BILLS
ĉantado de Torao / judoj en
Japanujo dum la 2-a Mondmilito
Flowe
- ★ **5:45 – 6:30 ptm**
Vespermanĝo
Belk Dining Hall
- ★ **7:00 – 8:00 ptm**
Tomaso ALEXANDER
Esperanto kiel familia hejmlingvo
Flowe
- ★ **8:00 – 9:00 ptm**
Alex MILLER
popolmuziko/blugraso per
kordinstrumentoj
Flowe



*La tuta kalendaro troviĝas
sur blanka tabulo en la
unua etaĝo de nia dormejo.*

La mistero de la Gerda-kontraŭdiro

Ĉu vi iam legis *Gerda Malaperis*? Laŭ la epilogo, iu “grava kontraŭdiro” troviĝas en la rakonto: Alivorte, en unu loko la aŭtoro diras ion, kaj en alia li diras la kontraŭon. Vi ne rimarkis, ĉu vere? Bedaŭrinde! Nun vi devos relegi la tutan tekston por trovi, pri kio temas. Se vi pensas ke vi scias, aŭ se vi volas diskuti ĉi tiun misteron, venu al *La Gerda-Mistero morgaŭ* (london) je 3:15 ptm en Flowe. Dankon! —Greĉjo FORĜISTO



La NASKa *Fasko* estas forumo por ekzerci vin en verkado kaj dividi viajn verkojn kun aliaj lernantoj. Portu kontribuajn (artikolojn, poemojn, ŝercojn, bildstriojn, plendojn, amleterojn, ktp.) al la redaktoro en ĉambro 112, aŭ (eĉ pli bone) sendu ilin al <nask.esperanto@gmail.com>.

obei. La parlamentanoj bezonas la monon por propangandi kaj esti elektitaj.

Tia metodo estas ofte uzata en politiko. Se parlamentantoj volas fari ion ne popularan, ili kunmetas ĝin kun io, kion la popolo, aŭ sufiĉe granda parto de la loĝantaro, volas.

Sendube, la plejmulto de la loĝantaro de Norda Karolino kontraŭas al la leĝo. Sed ekzistas sufiĉe granda grupo de laŭtaj, bone organizitaj homoj kiuj volas tian leĝon. La parlamentanoj simple kaptis la okazon por enŝovi leĝon, kiun iliaj entreprenaj subtenantoj volas.

Estas certe ke aŭ per la bojkotoj aŭ eĉ sen bojkotoj la neceseja parto de HB2 malaperos. Sed la partoj enŝovitaj sub la neceseja ombrelo restos.

La Nord-Karolina parlamento ne volas ke la urbo Charlotte havi minimuman pagon pli altan ol tio de la ŝtato aprobata, kiel havas ekzemple Seattle.

Neologismoj

de Mara ROCKLIFF

Pri neologismoj en Esperanto eble ekzistas diversaj opinioj, sed ĉu iu ajn povas malkonsenti ke ni, kiel NASKanoj, estu ĉiam ĉe la avangardo? Kompreneble ne. Mi do, tute memfide ke neniu povas nei, proponas al vi ĉiuj ke ni tuj adoptu la du sekvajn novajn kaj ege bezonatajn esprimojn:

1. *banana*

Signifo: ridinde facila

Helpa ekzemplo: “Esti ĉie, fari ĉion, solvi ĉiujn problemojn? Por Dio tio eble estus iomete tro, sed por Ellen, tute banana!”

Etimologio: En la meznivela klaso, nia instruisto Tim menciis ke io estas tute facila, tute banala afero, kaj kelkaj el ni misaŭdis “banana”.

Apologio: Ĉu tia senintenca komenco estas sufiĉe serioza por enkonduki novan uzon en jam dum multaj jaroj perfektigitan lingvon? Nu, oni respondu pri tio same kiel oni respondu pri la malkovrado de vulkanizita kaŭĉuko, penicilino, kaj la legenda kolizio inter arakida butero kaj ĉokolado. Kiam io estas tiel bela kaj tiel utila, kiu zorgas, kiel ĝi komenciĝis?

2. *tudo*

Signifo: aĉa sinteno

Helpa ekzemplo: “Mi tute ne aprezas tian tudon.” (aŭ *tudaĉon*, en aparte serioza kazo)

Etimologio: Tiuj, kiuj bone konas la anglan, tuj rekonos la radikon, dum tiuj, kiuj bone konas mian filinon, tuj rekonos la lingvan bezonon.

Apologio: Eble kelkaj samideanoj kontraŭos la enkondukon de anglismo en nian belan neŭtralan internacian lingvon. Tamen tiu esprimo jam ricevis la oficialan benon de Bertilo WENNERGREN, kaj kien iras Bertilo, ĉiuj saĝaj homoj nepre sekvas.



Jen mia modesta propono, mia donaco libere proponita al miaj karaj samideanoj. Uzu tiujn esprimojn, ĝuu ilin, kaj forte

laboru por disvastigi ilin ĉie en Esperantujo, por plibeligi la lingvon, plieduki la esperantistaron, kaj sendube tiel feliĉigi la ĉiean etoson, ke ni baldaŭ venigos la koran esperon de nia majstro Zamenhof, tutmondan pacon.

Nia Historio

de Ismary Lezcano GARCIA

*Vi estas sovaĝa kaj ankaŭ ĵaluza
eterna sonĝanto kun granda pasio,
mi estas kuraĝa kaj ege amuza
mia vivo dependas de mia fantazio.*

*Kiam la longaj tagoj silentas
ĉar sen vi la ĉiel' ne volas ridi
miajn korbatojn mi ne sentas
kaj mi ne povas decidi.*

*Vi alvenis al mi kun bela amkonfeso
mi pensis ke vi estos mia trezoro
sen dubi mi tuj kredis en la promeso
ke vi estos ĝardenist' kaj mi, via floro.*

*Suferas mi pro mia propra deziro
mi estus feliĉa kun via milda tuŝo
kaj ĉiuj aŭdas mian grandan sopiron
mi volas morti en via dolĉa buŝo.*

Kalemburo

danke al Zerbie

Homo iras en oficejon de kuracisto. Multaj katoj sekvas lin kaj grimpas sur li.

La kuracisto demandas: “Kio estas via problemoj?”

La homo respondas: “Mi havas kataron.”